

N° 194  
avril  
mai  
juin  
2021

# LA INFORMILO

N° 194  
aprilo  
majo  
junio  
2021

l'espéranto  
la langue de l'amitié  
sans frontières

**esperanto**  
France-Est

**ESPERANTO**  
2021  
*Justa komunikado*

esperanto  
★ estas ★  
mojosa!

## ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

## ESPERANTO

regroupant  
les départements  
**Bas-Rhin (67)**  
**Haut-Rhin (68)**

**Meurthe-et-Moselle (54)**

**Meuse (55)**

**Moselle (57)**

**Vosges (88)**

Maison des Jeunes  
et de la Culture

"Philippe Desforges "

27, rue de la République

**FR-54000 NANCY**


=====

**ABONNEMENT / ABONO**

**Papera versio: 18 €**

**Reta abono: 7,50 €**

Manfred Westermayer,  
membre d'honneur de  
BAVELO\*



Après son déménagement à Bonn, notre collaborateur allemand Manfred WESTERMAYER vient de se voir attribuer le titre de Membre d'honneur de l'association d'espéranto du Land de Bade-Wurtemberg (BAVELO) avec laquelle Espéranto France-Est collabore depuis de nombreuses décennies.

Comme pour de nombreux espérantophones, la Langue Internationale était devenue sa passion après la participation à des congrès internationaux où il a pu communiquer avec des espérantophones des quatre coins du monde.

Après ses études de chimie, Manfred Westermayer s'est lancé dans la politique et a créé en 1984, à Liège, une association internationale d'écologistes, l'Association des Verts Espérantophones, dont il fut longtemps le secrétaire général.

En collaboration avec des écologistes de nombreux pays et des écoles et entreprises de la région de Fribourg-en-Brisgau, il a réalisé de nombreux projets en Afrique (Tanzanie, Burundi, République Démocratique du Congo ...): aide à la plantation d'arbres, installation de l'eau courante, aide à l'enfance à Goma.

Les articles qui décrivent ses projets sont parus et paraîtront encore dans notre revue LA INFORMILO ainsi que dans la revue KONSTRUADO-kajero de TAKE, l'association internationale des espérantophones professionnels du bâtiment.



**Transponta Esperanto-Kongreso**

germana · pola · fervojista

Frankfurt (O) / Słubice  
21-a ĝis 24-a de Majo 2021

· **NAJBAROJ** ·



## Transponta virtuala Esperanto-Kongreso Germana, Pola, Fervojista De la 21a ĝis la 24a de majo 2021

Jam en 2020 estis planitaj tiuj kongresoj en la du urboj Frankfurto ĉe Odro (Germanio) kaj Słubice (Pollando), sed pro la pandemio, ili estis nuligitaj kun la celo ilin prokrasti al 2021. Tamen ankaŭ ĉi-jare ili ne povis okazi, tial ĉiuj kunvenoj, prelegoj, koncertoj okazis virtuale pere de zoom.

Aliflanke aliĝis pli ol 320 personoj kaj dum kunvenoj ĉeestis plej ofte pli ol 100 personoj. Certe tiamaniere povis ĉeesti pli da samideanoj eĉ el foraj landoj en Afriko. Ĉiuj aliĝintoj ricevis la abundan kongres-libron rete kun la kompleta programo kaj detaloj de ĉiuj prelegantoj.

Asociaj kunvenoj okazis en apartaj virtualaj salonoj.

Vendrede vespere okazis kanzonoj de Ĵele kaj Lena kaj muzik-

vesperon kun Jonny M.

Aparte interesa estis la prelego de Amri Wandel profesoro de la universitato de Jerusalemo, kun la temoj "Nigraj truoj kaj gravitaj ondoj".



**Nigraj Truoj kaj gravitaj ondoj**




Amri Wandel – Univ. de Jerusalemo

**Scienca Universitata Sesio 37**

GEA-kongreso 22.5.2021

### KIO ESTAS NIGRA TRUO?

#### Difino de nigra truoj

- Fermita regiono en la spaco-tempo, de kie nenio povas forkuri, eĉ ne lumo
- Ege densa maso, kiu englutas ĉion, kio proksimiĝas al tiu regiono
- Nigra truoj havas nur du trajtojn: maso kaj angula momentum (turniĝo)

#### Konciza historio de Nigraj Truoj:

1784 - Angla pastro, John Michell, unuafoje proponas la koncepton de NT: stelo kiu gravite englutas la propran lumon

1915 - Einstein publikigas la Ĝeneralan Teorion de Relativeco, kiu antaŭvidas NT kaj gravitajn ondojn

1968 - John Wheeler proponis la nomon "Nigra Truo"

1972 - Malkovro de la unua NT, Cygbus X-1

1955 - Malkovro de gigantaj NT en la centroj de nia galaksio kaj de aliaj galaksioj

2015 - Malkovro de gravitaj ondoj (Nobel premio 2017)

2019 - Unua foto de NT (en la galaksio M87)

#### La enigma malkovro de 9.2020

Plej granda distanco:  
7 miliardoj da lumjaroj  
Rekordaj masoj:  $66+85=142$   
oble la suna maso (tio ne estas aritmetika eraro!)



#### Masoj de nigraj truoj:

**Stelecaj** nigraj truoj- kun masoj plurfoje tiu de la Suno - krejgas de stela evoluo

**Gigantaj** nigraj truoj - kun masoj de milionoble ĝis miliardooble la Suno - troviĝas en la centro de galaksioj

**Jen la 3 eblaj evoluoj de steloj:**

- Steloj kun maso <8 Msuno, mortas kiel **blanka nano** kun fina maso de  $0,5 \cdot 1$  Msuno kaj diametro simila al la Tero
- Steloj kun maso 8-20 Msuno eksplodas kiel supernovao kaj iĝos **neŭtrona stelo**
- Steloj pli pezaj ol 20 Msuno lasos post sia supernovao-eksplodo **nigran truon**



**3 eblaj evoluoj de steloj**



**Gravitaj ondoj**

- Antaŭ 7 miliardoj da jaroj du nigraj truoj koloziis, kreante la plej grandan kosman eksplodon. Tiu informo atingis la teron, ne kiel videbla lumo sed per gravitaj ondoj: apenaŭ percepteblaj vibradoj en la spacotempo.
- Ĝi okazis en septembro 2015 per la speciala teleskopo LIGO (Lasera Interferometra Gravita Observatorio). Fakte 5 jarojn post la malkovro de gravitaj ondoj.
- De tiam LIGO ebligis malkovri ĉirkaŭ dek tiaspecajn eventojn (kolizio de du nigraj truoj en fora universo). Tamen en tiu nuna evento temas pri escepte grandaj nigraj truoj, kiuj laŭ la nunaj teorioj de stela evoluo, ne povus ekzisti.

**14.9.2015: unua malkovro de gravitaj ondoj: el kolizio de du Nigras Truoj**



**Vermo-truo**  
 "Kolo" aŭ "tunelo" inter du nigraj truoj kiu ligas du forajn regionojn en kurba spac-tempo. Teorie ebligas transsalti kaj super-lumajn vojaĝojn



Nigras truoj - A. Wa

## Distraj vesperoj en virtualaj koncertoj

Jam vendrede vespere eblis ĝui la kanzonojn de Ĵenja kaj Lena. La muzik-vesperon transprenis Jonny M. kun novaj kaj konataj kantoj. Tre viglaj kaj plaĉaj kantoj. Sabate por la distra vespere eblis ĝui la kanzonojn de Georgo Handzlik.



La impona grupo el Bjalistoko la Frey-Lech-Trio plenigis la sabatan muzik-vesperon.



Estis plezuro refoje aŭdi la agrablan voĉon de Kjara el Rimini en tre profesia Muzik-vespero. Ni ankoraŭ memoras ŝian koncerton en Wintzenheim en 2019.



Dimanĉe okazis la rok-konzerto de Jomo en pluraj lingvoj. Li kantis unuafoje en la turka.



Marek Nahajowski pri renesanca kaj baroka periodo

# Staĝo en Métabief de 15a ĝis la 22a de aŭgusto 2021

## Gastejo

La ĉaledo “Les Sapins de l’Amitié” (La Abioj de l’Amikeco) situas en la centro de Métabief, mezmontara skiejo, apud la svisa landlimo.

La gastiga skipo akceptos vin kaj zorgos pri via restado en 2 ĝis 6-litaj dormo-ĉambroj ĉe la unua etaĝo.

Estas ankaŭ granda teraso kaj ĝardeno (4000 m<sup>2</sup>)

Nia kuiristo kuiras bonkvalitajn manĝojn kaj proponos adaptitajn manĝojn laŭeble.

Purigado de la manĝilaro estas mane farita de la feriantoj mem (amika kaj muzika etoso!). Same ni bezonos vin por pretigi kaj malpretigi tablojn.




*Personoj, kiuj deziras pli da komforto, povos rezervi hotelon aŭ alian gastejon. Tiam ili povos nur tagmanĝi kaj vespermanĝi kun la aliaj partoprenantoj en la ĉaledo.*

**Eblos restadi nur kelkajn tagojn.**

## Kiel atingi la ĉaledon?

Per veturilo: Proksime de Pontarlier

Per trajno: TGV Paris Lausanne, haltejo Frasne, poste de Frasne, buso ĝis Métabief, 200m de la ĉaledo.



## Aktivĵoj (decidu je la komenco de la restado)

- Malkovro de la regiono: piede, aŭte... ĝian faŭnon kaj flaŭron.
- Akvaj ebloj ĉe la lago de Malbuisson: naĝado, pedal-boato, ...
- Vizitoj: Al Fromaĝejo, Mueleja Muzeo, Château de Joux (kastelo), Muzeo de la mekanikaj muzikoj, Montara muzeo en La Chapelle des Bois, fonto kaj akvofalo de la rivero Doubs, Citadelle de Besançon, Grotoj de Vallorbe, Saline d’Arc et Senans, Abbaye de Montbenoit, Ornans (muzeo Courbet), ktp.

La kursoj de Esperanto tri aŭ kvar kursoj estos proponataj.

Kursoj de 9a30 ĝis 12a (kun paŭzo je 10a30) kaj de 17a ĝis 18a30 (laŭ aktivaĵoj dum la posttagmezo).

Duontagaj migradoj por malkovri naturon esperante, aŭ ebleco de promenadoj per biciklo.

## La vesperoj

Prelegoj, ludoj, kantoj...

Ĉi-jare pro la pandemia sanitara regularo, ni povos akcepti nur 30 staĝantojn en la ĉaledo (lignodomo) kaj 10 pliajn kunmanĝantojn loĝantajn en alia tranoktejo.

La tabloj (ĉefe en la manĝo-ĉambro) estu pli distancigitaj.

La akcepto de la staĝantoj komenciĝos je la 10a, dimanĉon la 15an de aŭgusto kaj la dormĉambroj devos esti forlasitaj nepre je la 10a, sabaton la 22a de aŭgusto por ebligi sian desinfektadon



Esperanto en Chalonnois  
siège social: Mairie de Fragnes la Loyère 71 530

Kontakto: Anne-Marie Ferrier +336 78 45 60  
annemarieferrier@orange.fr  
aŭ [stagemetabief@orange.fr](mailto:stagemetabief@orange.fr)

**La limdato de staĝo-aliĝoj estas la 15a de Julio.**

## Bulletin d'inscription / Aliĝilo Métabief de la 15a ĝis la 22a de aŭgusto 2021

à renvoyer à / Bonvolu ĝin sendi al Anne-Marie FERRIER 20 rue de la Chesnaie  
FR-71530 FRAGNES - LA LOYERE Tél: 336 78 45 60 49  
ou/ aŭ al Vincent GERBE 33 Avenue des Marronniers FR 69270 FONTAINES-SUR-SAONE  
**avant le 16/7/2021- antaŭ la 16.07.2021**

<p><i>Pour inscrire une famille, inscrivez chaque personne séparément. Por familia, ĉiu persono sendu apartan aliĝilon</i></p> <p>Nom (familia nomo) : Prénom (persona nomo) : ..... Adresse (adreso) :..... ..... ..... Pays (lando) :..... Téléphone (telefono) :kun landokodo: ..... Adresse courriel (ret-adreso) : .....</p>	<p><b>Hébergement du 15 au 22 août 2021</b> Restado-kosto de la 15a ĝis la 22a de aŭgusto 2021 <b>340 €</b> 7 nuits et repas par personne/ 7 tranoktoj kaj manĝoj por unu persono</p> <p>Pour les personnes ne logeant pas au chalet 2 repas/jour par personne Por la personoj sen tranoktado sed nur manĝoj (2 manĝoj tage por unu persono) <b>240 €.</b></p> <p>Participation au stage d'Espéranto <b>50 €</b> Partopreno al la staĝo de Esperanto</p> <p>Séjour de qq jours seulement restado dum nur kelkaj tagoj (potage) <b>60 €</b> Précisez les dates/ Indiku la tagojn .....</p> <p><b>Total / Sumo</b> .....</p>
---	--

Courriel: [stagemetabief@orange.fr](mailto:stagemetabief@orange.fr)

L'hébergement comprend: la nuit, le petit déjeuner et 2 repas avec boissons.

La restado-kosto entenas: tranoktadojn, matenmanĝojn kaj 2 manĝojn tage kun trinkaĵoj.

Pratique alimentaire/ Manĝo-preferoj

Je mange de tout	<input type="radio"/>	Végétarien	<input type="radio"/>	Végétalien	<input type="radio"/>	Sans porc	<input type="radio"/>
Mi manĝas da ĉio	<input type="radio"/>	Vegetarano	<input type="radio"/>	Vegano	<input type="radio"/>	Sen porkaĵo	<input type="radio"/>

Pour les cours d'Espéranto, notez le cours suivi / elektita Esperanto-kurso

Débutant	<input type="radio"/>	Perfectionnement	<input type="radio"/>	Conversation	<input type="radio"/>
Komencanto	<input type="radio"/>	Perfekiĝo	<input type="radio"/>	Konversacio	<input type="radio"/>

**Je paie 100€ à l'inscription et le reste pendant le séjour**

**Mi antaŭpagas 100 eŭrojn aliĝante kaj la ceteron surloke, dum la staĝo.**



**Par chèque** à l'ordre de "ESPERANTO EN CHALONNAIS"

**Par IBAN per bankĝiro**

CME CHALON SUR SAONE

**Intitulé du Compte / al la konto:**

ESPERANTO-EN-CHALONNAIS

**IBAN: FR7610278025740002039720135**

**Code BIC** (Bank Identification Code) -

Code **swift**: CMCIFR2A

*ĝiro-celo: notu / Comme motif du virement notez:*

*stage du 15 au 22 août 2021 et votre nom, kaj vian nomon*

**Lieu / Loko..... Date / Dato.....**

**Signature / subskribo**

# 88-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

## Asizo, 20-27-aj de aŭgusto 2021

Temo: Sankta Francisko kaj la prediko al la birdoj:  
komunikado inter malsamuloj kiel vojo al paco



Programo kaj aliĝilo ĉe: <https://kongreso.esperanto.it/88/>

### Pri la urbo

La urbo **Assisi** (Asizo), konstruita proksime de la etruska teritorio, ne estis fremda al influo de tiu popolo. Nomata "Assisium" iĝis floranta romia municipo. Komence de la 3-a jc. disvastiĝis kristanismo danke al la martiro Rufino, ĝia unua episkopo. Post la falo de la imperio, la urbo estis detruita de la Gotoj de Totila (545 j.), okupata de la Bizancanoj, konkerita de la Langobardoj. Dum longa tempo ĝi estis parto de la duklando Spoleto. Refortikiĝis dum la 11/12-a jc per la unuaj spertoj de komunuma libereco, sed baldaŭ ĝi suferis pro militoj. Subigita de Frederiko la Ruĝ-barbulo, tie estis edukita Frederiko la 2-a de Ŝvabujo. En tiu periodo naskiĝis Sankta Francisko (1181 aŭ 1182) kaj Sankta Kjara (1193 aŭ 1194). Krom la imperia kaj papa dominado, la urbo elprovis la povon de Perugia, de familio Visconti, de dinastio Montefeltro, de Braccio Fortebraccio, de la Sforza; ĝi estis disŝirita de internaj luktoj (inter la "Partio de la Supro" kaj la "Partio de la Subo"). Ek de '500 ĝis 1860, escepte de la mallonga napoleona parentezo, Assisi estis parto de la Eklezia Ŝtato.

### Kongresejo kaj loĝado

La kongresejo nomiĝas **Hotel Il Cenacolo** kaj ĝia adreso estas *viale Patrono d'Italia, 70 – Santa Maria degli Angeli*.

Loĝado en

**Kvarstela hotelo Il Cenacolo**

**aŭ Tristela hotelo – Casa Lenori**

**Abunda programo dum la semajno kaj krome pluraj proponitaj Ekskursoj**

#### Sabate, 21 Aŭgusto 2021

Asizo: 15:00 – 18:30

Kosto: 15 €

#### Dimanĉe, 22 Aŭgusto 2021

Perugia-Torgiano 09:00 – 18:30

Kosto: 55 €

La urboj Perugia kaj Torgiano

Gubbio 15:00 – 18:30

Kosto: 30 €

#### Lunde, 23 Aŭgusto 2021

Lago Trasimeno 09:00 – 12:30

Kosto: 60 €

Spello 14:30 – 18:30

Kosto: 20 €

#### Marde, 24 Aŭgusto 2021

Cascata delle Marmore-Narni 09:00 – 18:30

Kosto: 55 €

Carsulae kaj akvofalo "Cascata delle Marmore"

Spoleto-Bevagna 09:00 – 18:30

Kosto: 55 €

#### Merkrede, 25 Aŭgusto 2021

Todi-Orvieto 09:00 – 18:30

Kosto: 55 €

Montefalco + Sagrantino

14:30 – 18:30 Kosto: 25 €

#### Ĵaŭde, 26 Aŭgusto 2021

Grotta di Monte Cucco 09:00 – 12:30

Kosto: 30 €



<b>Espéranto France-Est</b> http://esperanto.france.est.free.fr.				<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>	
<b>La Informilo</b>		Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>		Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>	
<b>Rédaction:</b> <b>Redaktoro:</b>		Edmond Ludwig kaj André Grossmann		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:		Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci		un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre	
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.					
<b>Komitato de la Asocio</b>			<b>Comité de l'Association</b>		
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso		
Prezidanto <i>Président et secrétaire</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr		
Help-sekretariino <i>Secrétaire-adjointe</i>	S-ino Liliane BERSWEILER 1 chemin du Lacé 54990 XEUILLEY	03.83.47.41.36 06 76 54 77 78	liliber54@yahoo.fr		
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	09.86.38.78.61	andreo.ag15@sfr.fr		
Libroservo <i>Service Librairie</i> Vic-prezidanto	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net		
Aliaj komitatanoj	S-ro Robert KUENY	09.71.31.37.62	kueny.robert@orange.fr		
<i>Assesseurs</i>	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr		
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net		
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr		
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr		
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net		
	S-ro Gilbert STAMMBACH	06 87 40 01 16	gilbert.stammbach@gmail.com		
<b>Abono al La Informilo</b> →	18 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <i>Abonnement à La Informilo</i>		
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>		← <i>Paiement par chèque au nom de</i>		
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>		← <i>Paiement par virement au compte</i>		
Per internacia ĝiro →	IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150		BIC: PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier		
1. Manfred Westermayer honorigita	15. Edmond Privat	<b>ISSN 0291 6037 trimestriel</b> <b>N° CPPAP : 0409 G 83517</b> Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle <b>Espéranto France-Est</b> MJC PhiJippe Desforges 27 rue de la République <b>54000 NANCY</b> Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b> Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : <b>30 septembre 2013</b> <i>Imprimé par l'imprimerie Sprenger</i>			
2. IFEF-kongreso nigraj truoj	16. Patrino letero rakonto				
3. IFEF-kongreso gravitaj ondoj	17. Patrino leterorakonto				
4. IFEF-kongreso koncertoj	18. Enigmoj kaj humuraĵoj				
5. Staĝo en Métabief	19. Matematikaj enigmoj + Filozofio				
6. Staĝo en Métabief	20. Cel-stacio en Pollando				
7. Itala kongreso en Asizo	21. Cel-stacio + Stranga malapero				
8. Komitatanoj kaj enhavo	22. Luminesk'				
9. Angulo + 4 kandeloj	23. Rememoro en Japanio				
10. La angla	24. Goma kaj ties akvo-problemoj				
11. Raporto de la kluboj	25. Goma kaj la vulkano Nyiragongo				
12. Raporto de la kluboj	26. Pom-arbo en Loreno				
13. Raporto de la kluboj + Video-ludo	27. Eŭropa tago				
14. Nia Libro-servo	28. Foto-paĝo: de vintro al somero				



**Estimataj gesamideanoj,**

Mia angulo ĉi-numera estos eta komento pri la artikolo de Michel Feltin-Palas "L'anglais sera-t-il un jour la seule langue parlée en France?", kiun vi legos sur alia paĝo de nia revuo.

Nu! Vi certe ankaŭ konsentas, ke aktuale la internacia mondvasta komunikilo estas la angla lingvo. Kvankam ni esperantistoj pro propra sperto opinias, ke Esperanto estus multe pli taŭga solvo pro la lernfacileco de la lingvo – kompare kun etnaj lingvoj-kaj la neŭtraleco rilate al la diversaj kulturoj, nia etika saĝa mesaĝo ne estas aŭdata, krom de kelkaj centmiloj (milionoj?) da personoj tra la tuta mondo. Esperanto estus avantaĝo por la homoj, kiuj penas akiri la necesan fluecon en la uzo de fremda lingvo.

Ni ĉiutage spertas la taŭgecon de Esperanto en la internacia komunikado, sed ĝis nun ni ne sukcesis atingi la amasojn. La movado eniris novan epokon, kie la perkomputila reta komunikado ege faciligis la rektajn kontaktojn skribajn kaj parolajn de la tutmonda esperantistaro. Esperdona fakto: multaj enretaj videoj montras al ni, ke tutmonda junularo uzas Esperanton plej flue post perreta studado.

Restas la demando: ĉu la asocia laboro efikas plu aŭ ĉu Esperanto subite tutnature, senklopede pandemios tra la mondo? Kiel aktiviĝos la reklama viruso?

E. L.

## La 4 kandeloj

La kvar kandeloj brulis malrapide  
La etoso estis tiom silenta,  
ke eblis aŭdi ilian konversacion.

La unua diris:  
*"Mi estas la paco!  
tamen neniu  
sukcesas teni min fajranta.  
Ŝajne mi baldaŭ estingiĝos."*  
Ĝia flamo rapide malkreskis  
kaj tute estingiĝis.

La dua diris:  
*"Mi estas la kredo!  
Ekde nun mi ne plu utilas,  
ne plu estas saĝe,  
ke mi restu pli longe fajranta."*  
Kiam ĝi estis tiel parolinta,  
venteto al ĝi blovis kaj ĝin estingis.

Malgaje la tria kandelo siavice intervenis:  
*"Mi estas la amo!  
Mi ne plu havas forton resti fajranta.  
La homoj lasas min flanke kaj  
ne komprenas mian gravecon.  
Ili eĉ forgesas ami siajn  
proksimulojn."*  
Kaj sen plia atendo, ĝi estingiĝis.

Subite eniris infano  
kaj vidis la tri estingitajn  
kandelojn  
*"Kial vi estas estingitaj?  
Vi devus fajri ĝis la fino"*  
Dirante tion, la infano  
ekploris.

Tiam la kvara kandelo  
ekparolis:  
*"Ne timu, tiom longe kiom  
mi havas flamon  
ni povos ekfajrigi la aliajn  
kandelojn,  
mi estas la espero!"*

Kun brilantaj okuloj  
la infano prenis la kandelon de l'espero  
kaj ekfajrigis la aliajn.

**Ke la espero neniam estingiĝu  
en niaj koroj kaj ke ĉiu el ni  
estu la necesa ilo por konservi  
la esperon, la kredon, la pacon kaj la amon.**



**2021 04 De Michel Feltin-Palas,**  
**L'Express <boutdeslangues@news.lexpres**  
 Michel Feltin-Palas mfeltin-palas@lexpress.fr

**L'anglais sera-t-il un jour la seule langue parlée en France ?**

**A vue d'homme, une telle évolution paraît plus qu'improbable, mais méfions-nous. Tout changerait si l'anglais devenait la langue de la réussite sociale. Or plusieurs mesures vont dans ce sens...**

Pourquoi ne parle-t-on plus **gaulois en France** ? La réponse est très simple : les Romains ont fait du latin la seule langue de la promotion sociale. Peu à peu, les Gaulois ont compris que, pour accéder aux meilleures places, il leur fallait maîtriser **l'idiome du pouvoir**. Une longue phase de bilinguisme gaulois-latin a suivi, mais la fin de l'histoire était écrite. Au Ve siècle de notre ère, le gaulois avait totalement disparu.

Pourquoi parle-t-on de moins en moins **breton à Quimper**, alsacien à Strasbourg, catalan à Perpignan ? La réponse est très simple: la France a fait du français la seule langue de la promotion sociale. Peu à peu, les habitants de toutes les régions de notre beau pays ont compris que, pour accéder aux meilleures places, il leur faudrait maîtriser **la langue du pouvoir**. Une longue phase de bilinguisme langue régionale-français a suivi, mais la fin de l'histoire semble écrite. Au 21e siècle, si rien ne change, toutes les langues de France autres que le français auront disparu de métropole.

Pourrait-on un jour **ne plus parler français en France** ? Peut-être. Comme on l'aura compris, tout dépendra de la **langue** qui sera **choisie** pour la **promotion sociale**. Tant que celle-ci restera le français, la menace sera marginale (malgré la profusion exaspérante des anglicismes). En revanche, si cette place était dévolue à l'anglais, la situation pourrait changer du tout au tout.

C'est en cela que plusieurs décisions prises ces dernières années sont inquiétantes. Qu'on en juge par ces quelques exemples :

- Le 16 mars 2021 est présentée la nouvelle carte d'identité nationale. Pour la première fois, tous les intitulés sont traduits en anglais.
- Le 4 février 2020 paraît un décret régissant les règles à respecter pour enseigner le français à l'étranger. Parmi celles-ci: "Faire valoir un niveau au moins B2 du cadre européen commun de référence pour les langues en anglais" (c'est-à-dire "parler avec naturel, aisance et efficacité") - et ce, y compris dans... les pays francophones.
- Le 3 avril 2020, un décret du Premier ministre Edouard Philippe subordonne l'obtention du BTS à une certification du niveau en anglais.
- Le même jour, un autre décret du ministère de l'Enseignement supérieur en fait de même pour les licences, les licences professionnelles et les diplômes universitaires de technologie.
- En 2013, la loi Fioraso avait déjà modifié la loi Toubon sur la langue française pour favoriser l'anglais dans l'enseignement supérieur et la recherche.

Visiblement gêné aux entournures, le ministère de l'Enseignement supérieur n'a pas répondu aux questions

de L'Express, mais on connaît ses motivations. Il considère que c'est en attirant des étudiants plus à l'aise en anglais qu'en français qu'il renforcera l'attractivité de nos universités. Une argumentation qui ulcère les amoureux de la diversité culturelle. "A moyen et long termes, ces dispositions jouent fortement en notre défaveur, commente le didacticien des langues Pierre Escudé. Car il n'y a pas de secret : ériger l'anglais en seule langue internationale est la plus sûre façon de tuer les autres et, dans notre cas, le français." Une pétition a ainsi été lancée par des enseignants et des enseignants-chercheurs de langues de l'enseignement supérieur contre ce qui est considéré comme une "atteinte au plurilinguisme au sein des universités par la seule obligation de l'anglais". Et tous de poser en substance ces trois questions.

**Un: comment convaincre un étudiant africain ou asiatique de l'importance de parler français si nous-mêmes jugeons préférable d'utiliser l'anglais dans nos universités ?**

**Deux: si un étudiant étranger souhaite suivre des cours en anglais, ne sera-t-il pas plutôt tenté de se rendre directement dans un pays anglophone ?**

**Trois: à quoi sert un examen en anglais pour aller enseigner dans un lycée français d'un des 43 autres états où le français est langue officielle et où l'anglais est marginal? comme le demande dans un article incisif le sociolinguiste Philippe Blanchet.**

Beaucoup, sans doute, jugeront ces cris d'alarme excessifs. A vue d'homme, de fait, il n'y a aucune chance de voir le français disparaître de France. Mais c'est précisément là qu'est le piège. Je le répète: il a fallu cinq siècles environ pour que le gaulois disparaisse. Et jamais, au 18e siècle, les habitants de Quimper, de Strasbourg ou de Perpignan n'auraient cru à l'effacement du breton, de l'alsacien ou du catalan dans leurs villes respectives. C'est pourtant ce qui s'est passé.

Soyons donc prudents. Ni vous ni moi ne verrons l'anglais remplacer le français dans les rues de Paris ou d'Orléans, cela est absolument certain, et c'est sans doute avec cette conviction que nos éminences prennent ces différentes mesures. Ce qu'elles ne voient pas, c'est qu'elles mettent le doigt dans un engrenage. Car si, peu à peu, l'anglais devient le passage obligé pour obtenir un diplôme de l'enseignement supérieur, il est un scénario noir que l'on peut facilement décrire : Les "meilleurs lycées" proposeront un enseignement en anglais renforcé pour favoriser la réussite de leurs élèves. Les familles en tireront les conclusions : pour favoriser la réussite de leurs chères têtes blondes, elles décideront de leur parler la langue de Shakespeare à la maison ou au moins de les faire garder par une *baby-sitter* (c'est le terme !) anglophone. S'en souvient-on ? Le très macroniste Benjamin Griveaux, éphémère candidat à la mairie de Paris, [avait proposé un enseignement de l'anglais... dès la crèche et la maternelle](#).

A tous ceux-là, on ne saurait trop conseiller de se pencher sur l'exemple des Pays-Bas, qui ont depuis longtemps donné priorité à l'anglais dans l'enseignement supérieur. Résultat ? Les universités locales manquent aujourd'hui d'étudiants dans les filières de littérature néerlandaise, lesquelles commencent à fermer leurs portes.

Est-ce bien cette voie que nous voulons suivre en France ?

# KLUB-RAPORTOJ 2020

## MULHOUSE

Agadraporto de 2020 de Mulhouse-Esperanto far la sekretario Robert Kueny.

Trista jaro 2020 pro virus-pandemio!

Preskaŭ ĉiuj antaŭviditaj aranĝoj estis nuligitaj. Nur ĉe la komenco de la jaro, la 10an de januaro, ni kunvenis por festi la tradician Trireĝan feston. Ankaŭ povis okazi la Ĝenerala Membrokunveno, la 7an de februaro.

Post legado, la agad-raporto kaj la financa raporto estis unuanime adoptitaj.

Poste ĉiuj kunvenoj estis nuligitaj de la Ŝtata Registraro ĝis la fino de la jaro.

Krome: Bertrand Wick sukcesis organizi tri kunvenojn “Verda Faden”, fine de junio, fine de septembro kaj fine de oktobro (tiu lasta kun nur tri partoprenantoj).

Ni ne re-menciu la nuligitajn aranĝojn!

Du bultenetoj de la SRK (Sud-Rejna-Kuriero) (far André Grossmann), la n-oj 75 de marto kaj tiu 76 de decembro, aperis. Jen ĉio!

Nia retejo daŭre funkcias. Nun estas elŝuteblaj ĉiuj numeroj de 2019.

La 9an de januaro 2021.

La sekretario: Robert Kueny.

## STRASBURGO 67

Jararaporto 2020 de Espéranto-Strasbourg  
Kompreneble pro la aĉa viruso la agemaj klubanoj ne plu regule kuniĝis monate en nia kutima loko. Tamen kiam kunvenoj okazis, tiam meze cirkaŭ 12 partoprenantoj ĉeestas: la 6an de januaro ni kune babilis kaj manĝis reĝkukojn, la 3an de februaro ni manĝis krespojn, la 2an de marto ni bonvenigis Luko (Luc Allemand), kiu prelegis pri sia granda bicikla vojaĝo ĝis Azio kaj pri siaj interesaj renkontoj.

Poste dum la trud-izoliĝo la klubanoj kunvenis interrete en aprilo, majo, junio, novembro kaj decembro.

La 4an de julio vespere kaj la 29an de aŭgusto tagmeze ni piknikis en la “Ĝardeno de du Riverbordoj” Ni starigis budon, kaj pendigis Esperantajn flagojn. Ĉiu-foje ĉirkaŭ 15 partoprenantoj (francoj, usonanoj, germanoj) ŝatis la agrablan etoson, kaj tie estas tre bona okazo por renkonti vide samideanojn por tiuj, kiuj nur

eklernis Esperanton rete sole per Duolingo.

La 5an de septembro dek klubanoj kuniĝis ĉe Bernardo por klasifiki pli ol 200 librojn de la kluba biblioteko.

La 19-20ajn de septembro 2020 okaze de la “Rentrée des associations” en Strasburgo, klubanoj deĵoris ĉe la budo de la asocio por disvastigi informojn pri Esperanto.

La ĝenerala membro-kunveno de Espéranto-Strasbourg okazis la 26an de septembro 2020.

La 5-an de oktobro ni prezentis Esperanton en nia kurso-ĉambro al novaj samideanoj.

Bedaŭrinde nur unu kurso povis okazi vide la 12-an de oktobro, tiam 6 lernantoj ĉeestis. Poste Bernardo daŭrigis per interreto la kursojn. Ili okazis lunde marde kaj ĵaŭde ĉe <https://meet.jit.si/Esperantokurso>

## THONVILLE 57

### Assemblée Générale du 24/08/2019:

Notre précédente Assemblée Générale a eu lieu à la **Maison des Associations Raymond Queneau à Thionville** avec 10 participants suivie d'un repas pris en commun. Le compte rendu de l'assemblée générale a été distribué précédemment.

### Rencontres mensuelles à la Maison des Associations Raymond Queneau à Thionville:

Six rencontres de 14H00 à 15H00 le jeudi ont eu lieu avec 5 à 7 participants. Bruno participe en visiophonie de octobre à mars 2020 aux réunions depuis Changsha en Chine ou il réside. Il nous parle de la vie quotidienne et de ses activités espérantistes dans ce pays.

Le 30/01/2020 une journaliste du Républicain-Lorrain vient à notre rencontre pour rédiger un article sur l'espéranto et prendre une photo. L'article d'une demi page publié le 07/02/2020 à pour titre “L'espéranto: crée en 1887, enseigné aujourd'hui”.

### Cours d'Espéranto:

#### Débutants et perfectionnement à Thionville:

Trois participants tous les jeudis avec Antonio à la Maison des Associations Raymond Queneau à Thionville.

## Actions réalisées:

### Conférence “Vivre dans un pays avec trois langues officielles” à Nilvange:

Conférence présentée par Yves Nevelsteen venant de Belgique, le 15/11/2019 au Café Culture Le Gueulard, 57240 NILVANGE. Organisé par le Forum des Citoyens de Nilvange et Esperanto Thionville.

Nous sommes une vingtaine dans l'assistance, espérantistes et non espérantistes.

Yves débute sa conférence à 20H30. Sur grand écran, on peut lire: “Vivi en lando kun tri oficialaj lingvoj”.

Il se présente ainsi: “J'habite au nord de la Belgique, à la frontière avec la Hollande.”

Autrefois, diverses langues, patois et dialectes étaient parlés en Belgique: prussien, français, roman et luxembourgeois.

La frontière entre Flandre et Wallonie a beaucoup changé avec le temps.

Bruxelles est une particularité qui se trouve en terre flamande mais où 80 % de la population parle français.

En 1815 c'est la défaite de Waterloo. Puis au Congrès de Vienne un nouveau pays, la Hollande est créée.

Pendant la 2e guerre mondiale beaucoup de flamands collaborent avec les nazis.

Situation actuelle:

- au nord, néerlandais et flamands;

- au sud, la Wallonie;

- à l'est en bleu sur la carte, les communes où l'allemand est officiel. Beaucoup de forêts. Peu de population.

Yves est un conférencier érudit qui a pu répondre à différentes demandes.

Nous finissons cette soirée intéressante et instructive à 22H30.

Un article rédigé par notre association paraît dans la revue de France-Est-Espéranto N°188 d'octobre 2019.

### Fête de Zamenhof:

Dimanche 15 décembre 2019 en commun avec la “*Luksemburga Esperanto-Asocio*” à Mondorf-les-Bains. Au programme: promenade guidée avec Brian Moon, repas convivial, puis l'après midi un exposé sur l'actualité littéraire en espéranto présenté par Istvan Ertl.

### Notre participation aux divers congrès et voyages:

L'année 2020 a été profondément marquée par les problèmes sanitaires causés par la pandémie du Covid 19 et pour cela les organisations espérantistes ont annulé de nombreuses manifestations comme le congrès Universel d'Espéranto à Montréal au Canada, le congrès de la fédération internationale des cheminots

pour l'espéranto IFEF à Francfort sur l'Oder en Allemagne et le congrès de l'Association des Travailleurs Espérantistes SAT à Bialystok en Pologne.

Cependant Bruno n'a pas pu revenir en France à cause de la pandémie. Il participe depuis chez lui en Chine par internet avec Zoom au 93<sup>e</sup> congrès de l'Association des Travailleurs Espérantistes Sennacieca Asocio Tutmonda SAT qui devait se tenir physiquement du 25 au 31 juillet à Bialystok. Sur la toile 256 participants des cinq continents se retrouvent au grès des différents fuseaux horaires de - 4 GMT à +10 GMT avec un programme en continue de réunions de travail, de conférences, de films et de deux concerts. Françoise Noireau nous présente comment elle a organisé dans son village breton un festival de langue avec des cours de plus d'une dizaine de langue du monde dont l'Espéranto. Une espérantiste française Annie Grent qui enseigne le grec et l'espéranto à des réfugiés sur l'île grec de Samos les interview au moyen de Zoom en direct avec les congressistes en utilisant l'espéranto, le français et l'anglais. Le nouveau dictionnaire PIV 2020 de SAT tout en espéranto nous est présenté par Bertilo Wennergren. Il est en version papier et électronique avec des nouvelles fonctions de recherches <https://bertilow.com/vortaro.net/>. Ce congrès par internet est une première qui a bien fonctionné techniquement et a permis de nombreux échanges intéressants entre les membres de l'association et les non membres qui n'ont jamais participé à ce congrès.

Bruno participe en vidéoconférence le 30/06/2020 à l'assemblée générale de la Maison Culturelle de l'Espéranto à Grésillon (Maine et Loire). Le bilan des activités est positif en 2019 avec 44 jours de stage pour 275 personnes au printemps, en été, en automne et la fête de fin d'année. Un stage en été et un autre en automne sont prévus.

Thomas participe en visioconférence au congrès mondiale de l'espéranto et aux journées de l'Europe Espérantiste.

Bernard a contribué au développement de l'application d'apprentissage de langues étrangères Duolingo pour les mobiles en travaillant en équipe sur la version française vers la langue cible espéranto. <https://www.duolingo.com/learn>

ESPERANTO-THONVILLE Maison des Associations  
Raymond Queneau 5 impasse des Anciens Hauts  
Fourneaux Zone du Gassion FR-57100 THIONVILLE  
@: [esperantothionville@laposte.net](mailto:esperantothionville@laposte.net) Tel. + répondre:  
+33 9 86 54 00 09

## NANCY

Raporto pri la aktivado de la grupo de Nancio (2020/2021)

Dum la lasta jaro, la grupo de Nancy malmulte funkciis, kompreneble pro la kronviroza pandemio. Denove, estis necese rezigni pri la organizado de la regiona staĝo,

Ankaŭ ne eblis partopreni la kutimajn asocio-prezentejojn (unufoje, en Festi la Vida, eĉ ne pro la pandemio, sed pro la aĉega vetero!).

Tamen, la membroj povis kelkfoje kunveni kaj

kursumi en la junuldomo, en la komenco de aŭtuno. Ni profitis la someran pandemi-paŭzon por manĝi en restoracio kun nia samideanino Lise Colomb, kiu vizitis sian filinon en Nancy, Kaj ni helpas junajn gesamideanojn en tradukado esperantlingven de videoludo, kiun ili preparas, Ni esperas revigligon de la grupo dum la venonta aŭtuno, kaj Liliane pripensas organizi tagan promenadon dum somero en la regiono de Graufthal.

Jean-Luc Thibias

## La videoludo **Samhain** nun ankaŭ en Esperanto!

Alicia kaj Steven, vi estas junaj kaj novaj esperantistoj, kaj vi deziras profesie uzi la internacian lingvon. Ni estas scivolemaj pri via projekto!

Sed eble unue, kelkaj vortoj pri vi mem?

- Ni estas sendependa videoluda studio nomata: **“Les Jeux de Bebel”** kaj ni estas malgranda teamo kun du personoj, edzo kaj edzino, ŝatantoj de tradiciaj animacioj 2D.

Kiam vi malkovris esperanton kaj kial vi deziris lerni ĝin?

- Ni malkovris esperanton antaŭ ĉirkaŭ 2 jaroj. Ni ŝatas la internacian aspekton de ĉi tiu lingvo kaj la eblajn interŝanĝojn kun la homoj el la tuta mondo. Nature, ni decidis traduki niajn videoludojn en esperanton por ekzerciĝi, sed ankaŭ, ebligi al ĉiuj ludi kaj kompreni niajn videoludojn.

Vi profesie laboras en mondo de videoludoj. Pri kio temas pli precize?

- Laŭ niaj modeloj kaj inspirfontoj, ni kreas niajn videoludojn per tradicia maniero, tiel por la kodo kiel por la artaĵoj. Do, ni specialiĝas en la 2D kaj niaj animacioj estas desegnitaj permane, bildo post bildo, kiel malnovaj Disney. La videoluda motoro estas konceptita per ni mem, sen antaŭkonceptitaj iloj. Ni kreas eĉ la sonojn mem! Estas esence al ni krei kvalitajn videoludojn, kun mekanismoj revizititaj kaj kiuj vivigos al la ludantoj grandajn belajn aventurojn.

Vi eldonis en januaro 2021 novan videoludon: “Samhain”. Pri kio tiu ludo?

- **“Samhain”** estas teksta aventura ludo, en kiu vi estas la heroo. Tio estas 2 dimensia ludo, kiel la realaj rolludoj, kie ĉiu el viaj elektoj estas grava kaj povas influi vian aventuron. Vi havas je via dispono malgrandajn paperojn, per kiuj vi povas agi, batali timindajn kreitaĵojn, unubrakajn... aŭ beletajn... kaj eĉ fari aĉetojn. Dank'al la diversaj disponeblaj elementoj (notlibro, glosaro...), vi eble estos barbara aventurulo aŭ ruza strategiisto!

Tiu ludo origine estis dulingva: franca kaj angla. Vi deziris aldoni esperantan version. Kial?

- Ni vere deziris, ke esperanto estu disponebla en nia ludo. Unue, por ke ĝi povu esti ludata kaj komprenata de ĉiuj. Sed ankaŭ, por malkovrigi ĉi tiun lingvon al tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas ĝin. Fine, estis esence al ni proponi modernan enhavon al tiuj, kiuj parolas Esperanton kaj kiuj ŝatas la videoludojn, kiel ni.

Kiam via ludo estos atingebla de ĝenerala publiko kaj kiel?

- Ni ankoraŭ laboras pri la traduko en esperanto de **“Samhain”**. Sed, ĝi estas preskaŭ finita. Nia videoludo estos senpage disponebla ĉe la retejo **“Kongregate.com”**, ĉe ĉi tiu adreso: <https://www.kongregate.com/games/JeuxBebel/samhain>

Ĉu vi bezonus helpojn de esperantistoj (testado, traduko alilingven. . .) ?

- Nuntempe, la asocio **“Esperanto France Est”** helpas nin pri la korekto de nia traduko de **“Samhain”** kaj ni dankas ĝin. La ludantoj povas helpi nin proponante siajn korektojn, per modulo de traduko disponebla en la ludo. Se ludantoj volas proponi aliajn lingvojn, ili povas kontakti nin per retmesaĝo ĉe ĉi tiu adreso: [lesjeuxdebebel.contact@gmail.com](mailto:lesjeuxdebebel.contact@gmail.com), [Tio estos granda plezuro.](https://www.kongregate.com/games/JeuxBebel/samhain)

Korajn dankojn Alicia kaj Steven, ni deziras plenan sukceson en via projekto!

- Dankegon al vi kaj al la asocio **“Esperanto France Est”**! La interesitaj ludantoj povas sekvi niajn aventurojn sur “Twitter”, “Instagram” ([@lesjeuxdebebel](https://www.instagram.com/lesjeuxdebebel)) aŭ eĉ subteni nin per nia Ko-fi (<https://ko-fi.com/lesjeuxdebebel>)! Ĝis baldaŭ! ♥





# El nia libroservo

## Informoj



⇒ Denove ne eblas diri, kiam la libroservo partoprenos regionan komunan semajnfinojn! Espereble en Bavelio, venontan aŭtunon!  
Ĝis tiam eble novaj libroj estos akireblaj en la esperanto budo de Fontenoy la Joute aŭ dum la regiona ĝenerala asembleo de Esperanto France Est, se tiuj eventoj okazos!

Ĝis iam!

Jean-Luc Thibias

libroservo.efe@laposte.net



## Novaj libroj

### 1) **PAŬLUS FONDINTO**, *Esprimaro*, Trevor Steele, Stafeto-F. E. L., 2020, 124 p., 10,20 €

La viro, kiun ni konas nun kiel "sankta Paŭlo", estis unu el la plej influaj homoj de la tuta homara historio. Pli ol unu historiisto diris, pli-malpli, ke eblas imagi kristanismon sen Jesuo, -sed ne sen Paŭlo. Alivorte, la vera fondinto de kristanismo estis Paŭlo.

Liaj propraj skribaĵoj kaj la vortoj de tiu-tempuloj donas bildon de Paŭlo: kuraĝa, persistema, kverelema, karisma, kaj absolute konvinkita pri sia misio, eĉ se li devis batali kontraŭ demonoj, reĝoj, kaj la tiamaj estroj de la Jesuo-movado.

Tamen, fine de la vivo Paŭlo preskaŭ desperis: ĉu lia vivo estis fiaska? Li ne povis antaŭvidi, ĝis kioma grado li mem muldos la estontan vivon de la Romia Imperio kaj poste la tuta mondo. (komento F. E. L.)

①



### 2) **SANGORUĜA FLAGO**, Romano, Trevor Steele, Stafeto-F. E. L., 2020, 206p., 16 €

Ekssoldatoj revenintaj el la Unua Mondmilito ofte malfacile readaptiĝis al civila vivo (oni pensu pri tiuj, kiuj formis la kernon de la partio de Hitler). Ankaŭ en Aŭstralio iamaj "milit-herooj", aparte la senlaboraj, estis ekspluatataj de reakciaj politikaj fortoj. Rezultis koleraj rasismaj amasoj de perfortemuloj. Samtempe estis inter naivaj idealistoj multe da entuziasmo por la bolŝevisma regado en Ruslando. Du "frontoj" formiĝis, kaj bataloj estis neeviteblaj. Kaj fone furiozis mond vasta gripa pandemio. Kia ŝanco estis, ke homa amo

②



## Por mendi librojn:

#### 1. Vi sendas vian mendon

- per poŝto al: Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE FR-54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
- per ret-poŝto al "**libroservo.efe@laposte.net**" - nur escepte per telefono: 06-77-90-49-61.

#### 2. Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:

- franca ĉeko je "**Esperanto France Est**" sendita al la supra adreso
- poŝta ĝiro al "**Esperanto France Est**" CCP 0 1997 72W NANCY"
- interbanka ĝiro al "**Esperanto France Est**" IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC PSSTFRPPNCY.

<i>Mendilo</i>		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En	la	Subskribo:

## Edmond Privat

**Jen artikolo de Edmond PRIVAT, iama ĉefredaktoro de la revuo Esperanto, sed ankaŭ grava ĵurnalisto de la svisa gazeto Le Temps kaj dumtempe eksterlanda korespondanto de tiu gazeto. Li verkis plej ofte pri internacia temaro kaj foje ankaŭ enigis esperantan temaron en siajn franclingvajn artikolojn.**

Vues sur le monde  
**De Boulogne à Bologne**  
**Edmond PRIVAT**  
 13 août 1955

Dans cette antique Bologne aux arcades rouges et aux tours penchées, une foule internationale emplissait l'autre jour l'Hôtel de Ville moyennâgeux où la municipalité recevait le maire de la cité jumelle de Boulogne-sur-Mer, accompagné de mille huit cents espérantistes de trente-cinq pays du monde.

La réception grandiose dans les magnifiques salles du palais si riche en peintures célébrait un jubilé mémorable: il y a cinquante ans que le vieux port gaulois de la Manche accueillait le premier congrès universel où l'espéranto fut la seule langue employée par tous les délégués.

Ce fut mon premier voyage d'écolier à l'étranger et l'impression demeure profonde. Au retour, le vénéré philosophe Ernest Naville, où il résidait en été, pour lui faire un rapport sur le succès de l'expérience, car c'était lui qui avait présenté l'idée du Dr Zamenhof à l'Académie des sciences morales et politiques à Paris.

Les deux hommes sont morts depuis longtemps et la langue auxiliaire a fait son chemin lentement. Sur la base de la grammaire simplifiée et du petit vocabulaire international de 1887 elle s'est enrichie, assouplie et développée comme tous les idiomes et tous les dialectes qui font leur entrée dans l'usage public et s'ennoblissent par une littérature. Depuis 1905 quarante congrès universels et une soixantaine d'autres conférences internationales techniques, professionnelles ou religieuses ont employé l'espéranto comme langue parlée.

L'Université de Bologne, la plus ancienne d'Europe, a retrouvé la semaine dernière un peu de l'atmosphère qui régnait dans ses couloirs il y a sept ou huit siècles quand ses étudiants de tous pays s'entretenaient en latin. Il s'agit aujourd'hui du "latin de la démocratie", et les journalistes qui connaissent la Tour de Babel d'autres congrès n'en reviennent pas d'entendre ces foules babillant et s'exclamant avec vivacité dans les corridors en une seule et même langue à la sortie

des salles où le recteur de l'Université de Parme, un physicien de l'Université de Vienne ou des savants japonais participent à la "Somera Universitato" qui complète le congrès.



Sur les mille huit cents personnes qui circulent dans cette ruche animée, les Scandinaves dominant à côté des Italiens, des Yougoslaves et des Français. En 1905, à Boulogne-sur-Mer, on distinguait facilement à l'accent les différentes nationalités, mais aujourd'hui la prononciation s'est unifiée grâce aux leçons par gramophone, aux émissions de radio et surtout aux rencontres internationales qui se multiplient.

La langue a pris des ailes et sert d'expression, parfois lyrique, au sentiment d'unité humaine que l'UNESCO cherche à répandre. Il y a des orateurs vraiment éloquents dans ces congrès, et ce latin moderne, aux voyelles sonores, ne ressemble en rien à l'idée barbare que s'en font les gens qui ne l'ont jamais entendu et qui jugent trop légèrement de ce qu'ils ne connaissent pas. Ils le croient encore artificiel, alors qu'il est devenu vivant depuis longtemps.

Ceux d'entre nous qui ont eu la chance de l'apprendre à l'âge d'écoliers ont de la peine à supporter l'anachronisme un peu ridicule du monde international arriéré qui s'obstine à maintenir un régime compliqué de traductions, de malentendus et de manque de contact intime et direct. Un congrès espérantiste est une oasis en comparaison.



## PATRINA LETERO

Novelo de Ewa Grochowska

Du semajnojn post la forpaso de la patrino, mia fratino, Floriano (ŝia tria edzo) kaj mi denove renkontiĝis en la domo de niaj gepatroj. Ni mole sidis sur la eluzita sofo kun glasoj da alkoholaĵo enmane. Malgajaj, ni silentis longajn minutojn. Mi glit-rigarde observis la meblojn, la paliĝintajn paper-tapetojn, la ekzotajn ornamaĵojn, kvazaŭ mi malkovrus unuafoje la universon de Panjo. Laodoro de malnovaj, polvozas tukaĵoj ternigis Florianon. Tra la grandaj salon-aperturoj videblis la ĝardeno. Nun ĉirkaŭata de altegaj domoj, kies fenestroj ŝajnis spioni la najbarojn, ĝi perdis sian antaŭan, intiman ĉarmon. Nur la olda pomarbo kun florplenaj branĉoj estis tiel bela, kiel en la tempo de nia infanaĝo.

Mia fratino kaj mi, instalitaj de multaj jaroj eksterlande, plezure gastigis nian patrinon ĉe ni, sed malofte ni revenis hejmen. La patrino bonege mastrumis sian ĉiutagan vivon. Aĝa je naŭdek jaroj, forprenita de pulma embolio apenaŭ kelkajn tagojn post la diagnozo, ŝi mallonge suferis.

La vilao kaj ĝia ĝardeno, la solaj riĉaĵoj, kiujn la gepatroj lasis al ni, estis plenaj de bonaj memoraĵoj. Tamen eĉ dum la ferioj, neniu el ni emis loĝi ĉi-tie. Do, antaŭ ol publikigi la anoncon pri la vendo, ni devis malplenigi la ĉambrojn. Ordigante la diversajn aĵojn, ni ekvidis malnovajn foto-albumojn, kiuj atestis pri nia feliĉa familia vivo. Nia patro, marista oficiro ofte forestis, kaj ni atendis senpacience liajn revenojn. Kiam la patro ŝipvojaĝis profesie, niaj gepatroj regule korespondis. Ni retrovis iliajn flaviĝintajn leterojn, kortuŝan pruvon de la granda amo, kiu unuigis ilin. Tamen okazis en la vivo de nia patro periodo, pri kiu li neniam parolis. Ni nur sciis, ke en la jaro 1947, li iĝis memvola militisto en Hindoĉinio. Unu jaron poste, la vjetnamoj kaptis lin. Li estis unu el tiuj malliberuloj, kiujn la vjetnamoj kruele pritraktis kaj al kiuj ili "lavis la cerbon".

Paĉjo estis kvindek-kvarjara, kiam li emeritiĝis, dum Panjo, flegistino, daŭre laboris en hospitalo. Neatendite nia patro pasiiĝis pri la ĉasado. Li aĉetis grandan hundon, dobermanon, kiu minace bojaĉis, kiam iu gestadis aŭ parolis laŭte proksime de la mastro. Krome, Patro sekrete redaktis siajn memoraĵojn. Poste, legante lian libron "Du jaroj ĉe la Viêt Minh" ni pli bone komprenis, kion li travivis. Li estis kondamnita al morto estiel, laŭ la vjetnamoj, eksterlanda milit-krimulo, kiu

venis batali kontraŭ la libereco de la popolo. Li profitis de mildigaj cirkonstancoj konfesinte, ke li agis sub la influo de la koloniisma propagando. Dank'al tiu deklaro li rajtis peti la bonvolan indulgon de la Prezidento Ho Chi Minh, kaj la respondo estis pozitiva. Amnestiita, li troviĝis en kaptitejo en la regiono de Vinh.

En tiu loko multaj homoj pereis pro elĉerpiĝo, gangreniĝintaj vundoj aŭ paludismo, do dum du jaroj la vivo de Paĉjo necerte pendis sur malforta fadeno.

\* \* \*

Vespermanĝante, eble pro la influo de alkoholaĵoj, ni reparolis pri niaj gepatroj kaj ĉefe pri ilia kapablo resti tiel longe feliĉaj en la geedzeco.

– La gepatroj konatiĝis kiam ili estis tre junaj. Ilia geedziĝo okazis post la reveno de Paĉjo el Hanojo. Bedaŭrinde, ili ne havis la tempon por festi la oran datrevenon de tiu evento sed ilia amo daŭris pli ol kvardek jarojn. Vere bonŝancaj ili estis! – resumis emfaze mia fratino.

– Sed mi demandas min, ĉu ili iam malfidelis unu la alian? Kion vi opinias pri tio, fratino? – diris mi peneme.

– Mi nenion opinias kaj nenion volas scii. Ĉiamaniere, en la familio oni ne aŭdis la plej malgrandan klaĉaĵon pri tio, – respondis la fratino incit-voĉe.

– Tamen mi memoras la viron, kiu vizitis Panjon la tagon en kiu nia patro partoprenis la renkontiĝon kun maristaj ekskolegoj. Ŝi jam estis kvardek-kvar- aŭ kvardek-kvinjara. Tiun tagon mi prelegis en la proksima urbo kaj lastmomente mi decidis viziteton al la gepatroj. Kiam mi alvenis, la viro estis foriranta. Panjo aspektis ĝenata, ŝi nenion klarigis pri li kaj mi ne demandis.

– Tio nenion signifas. Krome, kial vi parolas nur pri Panjo? Ni ĉiuj scias, kion oni diras pri la maristoj: unu amantino en ĉiu haveno. Vi nervozigas min! Vi ĉiam enŝovas la nazon en nekonfesindajn aferojn, rimarkis la fratino ofendo-voĉe.

Ni enlitiĝis fruvespere. Je mezonokto mi vekiiĝis ŝvitanta pro iu el tiuj sonĝoj, en kiuj oni sentas sin kvazaŭ ili okazus reale. Mi sonĝis pri Panjo en tiu periodo, kiam, jam pli ol kvindekjara, ŝi deziris aspekti pli juna. Ŝi kolorigis siajn harojn en rufan koloron kaj vestis sin per juĵoj, kiuj videbligis ŝiajn longajn krurojn. Ŝi ankoraŭ estis belega. En mia sonĝo ŝi same aspektis. Ŝi proksimiĝis kaj gravmiene transdonis al mi leteron, dirante: "Mi bedaŭras. Pardonu min!"



La morgaŭon mi ellitiĝis frumatene pro neeltenebla kapdoloro. Rigardante mian fratinton kaj Florianon, mi tuj komprenis, ke ankaŭ ili dormis tre malbone. Ili aŭdis strangajn bruojn, kriojn, hundajn bojadojn. Floriano ŝercis asertante, ke fantomo hantas la domon. Mia fratino tute ne ŝatis liajn mokojn, do dum la matenmanĝo ni ĉiuj silentis, kaj la etoso estis peza. La tutan tagon ni eligis pakaĵojn, vestaron kaj tukaron el la ŝrankoj ĉar baldaŭ la mendita kamiono forportos la meblojn. La dua punkto estis same malagrabla kiel la unua.

Mi turniĝis enlite, pensante pri tiu nekonato, kiun mi preter-renkontis sur la sojlo de la domo antaŭ tridek ses jaroj. Mi vidis lin nur kelkajn sekundojn, sed mi estis certa, ke lia vizaĝo estis iel rimarkinda. Kial do? Tiu memoraĵo estis tre nebula... Kiam mi sukcesis ekdormi, la sama sonĝo revenis, ĉi-foje interrompita de hunda bojado en la ĝardeno. Iom timigita mi pensis pri Brikso, la hundo de Paĉjo, kiun oni devis eŭtanazii pro hepata malsano. La gepatroj estis tre afliktitaj pro ĝia malapero, ĉefe Paĉjo, kiu ofte estis sola hejme. Paĉjo forpasis kelkajn monatojn post la eŭtanazio de Brikso.

Matene oni elprenis la meblojn. La domo iĝis senpersoneca, malvarma, preskaŭ malgastema, la malplenaj ĉambroj ŝajnis pli grandaj. En la dormo-ĉambro de Panjo, post kiam ni forigis la vestoŝrankon, ni malkovris en la muro malgrandan kavaĵeton maskitan de la dika tapeto. Tie kaŝiĝis metala kofreto. La ŝlosilo lasita en la serurtruo estis invito por rapide malkovri ĝian enhavon. Ni trovis kaj tuj legis la leteron.

“Karegaj filinoj,

Eble vivanta mi ne sufiĉe ofte esprimis mian amon al vi. Vi estis miaj sunradioj, miaj trezoroj, kaj mi ĉiam fieris pri viaj sukcesoj. Mi dolore kor-suferas, pensante pri viaj sentoj, kiam vi malkovros, kio okazis en nia domo. Dum multaj jaroj post la forpaso de via patro mi intencis rakonti tion al vi, sed mi neniam kuraĝis. Mi ne deziris ĉagreni vin. Tial mi decidis nenion riveli ĝis la fino de mia vivo. Mi petas, pardonu min!

Eble vi memoras, Katjo, tiun viron, kiun vi foje pretervidis nia-hejme. Ĉu vi memoras lian vizaĝon? Ĝi havis aziajn trajtojn. Tiu nekonato venis renkonti vian patron, sed li ne klarigis al mi la celon de sia neanoncita vizito. Ekscianta la neĉeeston de via Paĉjo, li baldaŭ foriris, nur dirante: “Mi revenos”.

Kiam mi informis vian patron pri tiu evento, li estis ege surprizita kaj havis neniun suspekton pri la identeco de la vizitinto. Post unu semajno, kiam mi estis revenanta hejmen el la hospitalo, mi ekvidis Brikson saltanta kolere sur la verando-ŝtupoj. De tempo al tempo, ĝi skrapis la pardonon, kvazaŭ ĝi bezonus eniri. Trairinte la sojlon mi aŭdis nekonatan laŭtan voĉon venantan el la

labor-ĉambro. Mi do subaŭskultis. Nekonato klarigis, ke li trovis nian nomon kaj adreson post kiam via patro publikigis siajn memoraĵojn. La nomo de la aŭtoro koincidis kun tiu, citita en la dokumentoj de la vjetnamoj. Tiam via patro estis membro de la militista taĉmento de “purigantoj” en Hindaĉinio. La viro akuzis lin pri la mortigo de multaj vilaĝanoj en la jaro 1948. Ankaŭ la gepatroj de tiu viro estis inter la viktimoj. Lin mem savis mirakle lia avino.

Via patro respondis, ke tiam li estis soldato kaj nur obeis la ordonojn. Tamen la malamika voĉtono de la vjetnamo altiĝis. Laŭ li, via patro havis neniun pardonpeton. La obtuza bruo de la korpo, falanta teren, agigis min. Mi bruske malfermis la pardonon. Via patro kuŝis surplanke, la vjetnamo klinis sin al li kun tranĉilo en la mano. Mi histerie kriis. La viro hezitis unu sekundon. Tiumomente Brikso traŝoviĝis inter miaj kruroj kaj ĵetis sin sur la entrudulon, kiu falis malantaŭen kontraŭ la kamenon. Brikso profundigis la dentojn en la brakon de la agresinto kaj ne plu obeis mian ordonon lasi sian kaptiton.

Senpense, via patro prenis la pafilon kaj pafis du fojojn al la hundo. Tio servis al nenio ĉar ni konstatis, ke la viro jam mortis pro la kapfrapo. Terurita, ni ne sciis kion fari. Via patro, oficiro, multfoje distingita dum sia militista kariero, deziris eviti skandalon. Ni decidis diskrete enterigi la korpojn de la povrulo kaj de Brikso sub la pomarbo. Neniam ni estis maltrankviligitaj de la polico. Tamen ekde tiu evento via patro kaj mi ofte konis sen-dormajn noktojn. Nia vivo iĝis infero: ni ne plu invitis amikojn, ne plu ridis, ne plu estis serenaj.

Mi trovis iom da konsolo en mia laboro sed via patro obsedata de rimorsoj pro la morto de tiu vjetnamo travivadis neelteneblajn momentojn. La scenoj pri la milito en Hindaĉinio senĉese hantis lin. Li malfortiĝis iom post iom. Li forpasis kelkajn monatojn post tiu dramo.

Miaj karaj filinoj, se vi legas tiun leteron, tio signifas, ke mi ne plu estas vivanta. Mi ne scias, ĉu vi decidis vendi la domon. Tamen, se vi projektas tion, vi devas antaŭe okupiĝi pri la korpo en la ĝardeno. Mi ege bedaŭras pro tiel terura heredaĵo.

Via patrino, kiu ĉiam amis vin pli ol ĉion.”

\* \* \*

Ĉi tiu novelo aperis en la oktobra numero de La Ondo de Esperanto (2020). Represo permesata kun konsento de la aŭtorino. Ĉe represo aŭ citado bonvolu nepre indiki la fonton: Papere: La Ondo de Esperanto, 2020, №3 (305). Rete: La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2020/11/grochowska> [https://sezonoj.ru/2020/11/grochowska/?fbclid=IwAR\\_25nkOUq8USJ-8vzkieglGYW0pl39Uz62pl\\_LVphjSvxEnk\\_Q\\_QICzMk2yTc](https://sezonoj.ru/2020/11/grochowska/?fbclid=IwAR_25nkOUq8USJ-8vzkieglGYW0pl39Uz62pl_LVphjSvxEnk_Q_QICzMk2yTc)

## Ni lernu per enigmo kaj humuraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1					■					
2						■				
3									■	
4				■						
5					■					
6			■							■
7	■		■				■			
8								■		
9				■					■	
10										

G.J.

### Enkonduko:

La judaj svatistoj (edzperantoj) estis famaj pro sia ruzeco.

Juda svatisto venas al la malriĉulo kaj diras:

*"Mi volas aranĝi geedziĝon al via filo."*

La malriĉulo respondas:

*"Mi neniam enmiksiĝas en la vivon de mia filo."*

La svatisto respondas:

*"Sed la knabino estas la filino de la pariza milionulo Rotŝild."*

La patro diras:

***"Ho, en tiu okazo..."***

Poste la svatisto iras al S-ro Rotŝild:

*"Mi havas judan edzon por via filino."*

*"Sed mia filino estas tro juna por geedziĝi."*

*"Sed tiu junulo jam estas vicprezidanto de la Monda Banko..."*

***"Ho, en tiu okazo..."***

Fine la svatisto iras al la prezidanto de la Monda Banko.

*"Mi havas por vi junan kandidaton al vicprezidenteco."*

*"Sed mi jam havas pli da vicprezidantoj ol bezonate."*

*"Sed tiu junulo estas la bofilo de Rotŝild."*

***"Ho, en tiu okazo..."***

Profesoro pri filozofio klarigas al siaj studentoj:

*"Ni ĉiam relativigu la aferojn de la vivo! Ĉefe gravas en la vivo, malsato, malsano, morto kaj ceteraj aferoj estas nur etaj bagatelaĵoj..."*

Subite li paliĝis..

*"Diable, mi tute forgesis informi mian edzinon, ke ŝi ne forgesu registri la elsendon de la ĉi-vespera futbalmatĉo!"*

### HORIZONTALA:

1. Plena senmova aer'. Mediteranea plant', kies sekaj tigoj estis iam uzataj por transporti fajron.
2. Rapida kresk' de vento. Maŝin' por suprenlevi akvon.
3. Aroma herb' uzata kiel spico.
4. Denove. Komisiit'.
5. INVERSE: parto de la korpo inter kapo kaj trunko. Plantmalsano kaŭzata de fungoj.
6. Ĉindevena lud'. Konsistanta en materio kiel fero, aluminio...
7. Litera nomo. Vicmontra numeralo.
8. Vort' au esprim', kiu estas tre malofte uzata en la lingvo. Sufikso.
9. Malestimida person'. Uro sen koro.
10. Tenso kiel preterito.

### VERTIKALE:

1. Proced' de senkontakta presado.
2. Subbrako. Samsonec' en poezio.
3. Flava maseto supraĵe de ovario. Hobi'.
4. Etendaĵ' de sala akvo. Mallongigo de distanco. Ir-voj' en parko.
5. INVERSE: Tuk', kiun virinoj portas sur la ŝultroj. Lageg' en Usono.
6. Estos amika vizitanto ĉe la hejmo de iu.
7. Grandega. Kapo de muelisto !
8. Grajn-vora mamulo. Numeralo.
9. Metal' multvalora. Ionia insulo, reĝolando de Uliso.
- 10..Seri'. Sovaĝa porko.

Viro dezirante vendi sia aŭton, metis afiŝeton sur la malantaŭan vitraĵon de sia aŭto, sur kiu aperis la numero de lia poŝ-telefono.

Li trankvile veturas al sia laborejo. Tiam subite eksonas lia aparato.

*"Bonan tagon! Ĉi-tie la polico... Ni sekvas vin kaj konstatas, ke vi telefonas stirante. Ĉu vi ne scias, ke tio estas malpermesata? Bonvolu halti ĉe la vojrando!"*

Iom ebria viro timas rehejmiĝi tiom malfrue. Li petas sian kunulon, kiu trinkas apude...

*"Ĉu, ĉu mi petas vin, kioma horo estas nun? Post du minutoj estos nokto-mezo..."*

La petanto kolereme reagas..

*"Mi volas koni la nunan horon, ne post du minutoj!"*

Sekretariino de fama psikiatro anoncas:

*"Nun temas pri problemo de duobla personeco.. - Bone, enirigu! Tamen, nur unu post la alia!"*

### **SOLVO de KVE 193:**

#### **Horizontale:**

- 1.KRONVIRUSO 2.RADIUM. JAK 3.ATIK. PO. KR.
- 4.SEMESTR. 5.PO. LARM. AĴ. 6.ODNORF. EMA.
- 7.SOR. KELNER. 8.MASK. ANT. 9.GB. MITO. TE
- 10.NATUS. KO. 11.OKULTISMO.

#### **Vertikale:**

- 1.KRAMPOSIGNO. 2.RAT. ODO. BAK. 3.ODIS. NRM.
- TU. 4.NIKELO. AMUL. 5.VU. MARKSIST.
- 6.IMPERFEKT. 7.OSM. OKS. 8.UJ. ENA. OM.
- 9.SAKRAMENT. 10.OKR. ĴARTEL

## Matematikaj enigmoj

### • La patro, la tri filoj kaj la pomoj

“La patro aĉetis kvanton da pomoj. Tion li disdividis al siaj tri filoj. Al la unua li donis la duonon de la tuta kvanto plus duonpomon. Al la dua li donis la duonon de la restinta kvanto plus duonpomon. Same li agis kun la tria filo. Fine, ne plu restis eĉ unu pomo. Kiom da pomoj aĉetis la patro? Kiom da pomoj ricevis ĉiu filo?”



### • La diablo kaj la pigrulo

“Neniu amis la pigrulon, ĉie oni kondukis lin per la vortoj: iru al la diablo! Tiel la pigrulo iris al la diablo kaj petis ĉi-lastan instrui lin kiel gajni facile la monon. La diablo diris:

“Ĉu vi vidas tiun ponton? Se vi transpaŝos ĝin, la mono en via poŝo duobliĝos. Vi konstatos tion nepre. Sed por ĉi konsilo vi devas pagi al mi 24 eŭrojn.”

La pigrulo sekvis la konsilon de la diablo kaj transpaŝis la ponton. Konstatinte envere, ke la mono en lia poŝo duobliĝis li pagis la diablon per 24 eŭroj. Sed li volis provi denove la ŝancon.



Li transpaŝis la ponton eĉ tri fojojn kaj ĉiufoje la pigrulo pagis la diablon per 24 eŭroj. Fine en lia poŝo ne plu restis mono. Ĉu vi povas diveni kiom da mono havis la pigrulo dekomence en sia poŝo?”

### • Problemo de Vidmano (1489)

Leono formanĝas ŝafon ene de unu horo, lupo formanĝas ĝin ene de 4 horoj kaj ŝakalo ene de 6 horoj. Dum kiom da horoj povus formanĝi la ŝafon kune leono, lupo kaj ŝakalo?”

**Atentu:** Laŭ nia sperto plimulto de studentoj donas ne precizajn respondojn, eĉ kelkaj el ili ne komprenas, ke tiu tempo devas rezulti malpli ol unu horon.



### • Problemo de Husuirt-o (1501):

“Iu masonisto konstruas domon ene de jaro, alia masonisto ene de du jaroj, la tria ene de tri jaroj, dum la kvara ene de kvar jaroj. Dum kiom da tempo la domo finkonstruiĝos je kvaropo de masonistoj?”



## Ŝako: Filozofio kaj Matematiko

La invento de la ŝakludo originas el la 4-a jarcento antaŭ nia erao. Oni diras, ke la gubernisto de hindua princo imagis ĝin kiel parabolon. Li volis instrui al la juna princo, ke la reĝo certe estas grava figuro, sed estas nenio sen la subteno de siaj regatoj.

Tio ŝajnis tiel lerta kaj tiel mirinda al la suvereno, ke li tuj decidis rekompenci lin pro tiu eksterordinara invento:

- Postulu de mi, kion vi volas, li diris, kaj mi donos ĝin al vi.

La instruisto trovis la oferton de la princo tiel aroganta, ke li decidis instrui al ĝi duan lecionon.

- Mi ne multe petas de vi, li diris al li. Vi vidas tiun ŝaktabulon. Ĝi enhavas 64 kvadratojn. Simple metu grajnon de rizo sur la unuan kvadraton, du sur la dua, kvar sur la tria. . . kaj tiel plu, duobligante la nombron de grajnoj ĉiufoje.

Tiu peto ŝajnis al la princo tre modesta. Kaj tamen, kiam li rakontis pri tio al siaj matematikistoj, ili klarigis al li, ke neniu reganto en la mondo povus doni tian kvanton da rizo, taksita je:

**18 446 744 073 709 551 615 grajnoj**

La produktado de la tuta tero ne sufiĉus.

La princoj de tiuj tagoj tre bonŝancis havi tiel saĝajn kaj sagacajn instruistojn.

Laŭ azia tradicio.

*En la filozofia ateliero*

*Nia percepto restas limigita. Ĝi malfacile imagas la senlime grandan aŭ la senlime malgrandan nombron. Preskaŭ ĉiu el ni sendube farus la saman eraron kiel la princo kaj konsiderus modesta tiun donacon de grajnoj de rizo. Same, plej multaj homoj, kiuj ludas loteriajn ludojn (grat-kartoj kaj aliaj. . .) apenaŭ imagas, ke ilia ŝanco gajni la grandan gajnon egalas al unu el pluraj milionoj, kvazaŭ ĝi trovas apartan grajno de sablo en la mezo de tuta duno. . .*

*Kaj tamen, eĉ kiam ni scias tion perfekte, kial iuj malgraŭ ĉio estas tentataj ludi.*

*Les Philo-fables (La filozofiaj fabeloj), Michel Piquemal.*

*Elfrancisgis Bernard Behra.*

## CEL-STACIO Czesław Ostankowicz

### Rakonto el "Paŝoj al plena posedo"

La stacieto estis malgranda kaj sufok-aera. Sur la muroj enuis land-konigaj afiŝoj. La horloĝo malfunkciis. Ĝin strekis kruce gluitaj gazet-strioj. Sur la rando de malfermita fenestro dormetis la kato de la fervojisto. Malantaŭ la kasa giĉeto homo suferis pro varmego. Li rekonsciigis nur je la voĉo de pasaĝero.

"Kien?"

"Egale.

"Per kia klaso?"

"Egale."

"Do eble Gzdzin?" demandis la kasisto. Li rigardis ne la pasaĝeron, sed la horaron tie sur la muro al-najlitan, pri trajnoj trakurantaj lian stacieton.

"Povas esti Gzdzin", konsentis la kliento.

"Principe PKP\* devus koni la cel-stacion de siaj klientoj" grumbletis la fervojisto kaj reiris al la tableto, sur kiu kuŝis bilet-kajeroj. La kasisto estis malalta sekiĝinta olduleto. Li havis vulpecan vizaĝon de miopulo.

"Do Gzdzin?"

"Gzdzin."

"Tie estas nun malsvarme. Vi iras, sinjoro, ekzemple per vojo Z. Arbaro, vojetoj, vi plezure laciĝas per tiu arbaro. Vi povas kuŝiĝi ĉe la vojo, kuŝi kaj pensi nenion."

"Bone", diris la pasaĝero, "mi ne volas pensi". La kasisto komencis plenigi la blanketon.

"Kombinata. Estos kombinata. Al Konopiski ekspreso kaj poste normala."

"Ne", oponis la pasaĝero. "Ne povas esti kupeo-ŝanĝo. Mi pensados pri tiu damna kupeo-ŝanĝo kaj mi ja diris, ke mi ne volas pensi. Pri nenio."

"Aha", konsentis la kasisto. Li komencis skrapeti la kalvaĵon. Li studis la horaron, kvazaŭ li ne konus ĝin parkere.

"Ĝis la tria dudek tri mi havas por vi, sinjoro, nenion sen kupeo-ŝanĝo. Je la tria dudek tri iras laborista trajno al Wołów."

"Donu al Wołów", diris la pasaĝero.

"Per la dua klaso?"

"Povas esti dua."

"Mi donos al vi la unuan", diris la kasisto, "en la dua povas esti plenplene. En Wołów estas hodiaŭ foiro."

"Foiro?" maltrankviligis la pasaĝero. "Mi ne volas vian Wołów. Mi ne volas hom-amason. Mi volas kvieton. Sen homa ridado, sen kvereloj, sen voĉoj. Sen virinoj, sen amikoj, sen infanoj. Damnon al tia kia vi. Kasisto, kaj ne kapablas vendi biletan al homo."

La fervojisto jesis kompreneme. Vere estis al li domaĝe, ke li ne scias helpi la pasaĝeron. Al liaj devoj apartenis ĝusta priservado de la PKP-aj klientoj. Li estis sperta kasisto. Dum sia vivo li certe vendis milionon da diversaj biletoj kaj pasaĝerojn li havis diversajn. Li ankaŭ



pri tiu ne miris. Estis nenio mirinda. Simple estis malbone al la ulo. Tiaj ne konas siajn celstaciojn. Ili fuĝas nenien. Li aliris la horaron kaj komencis serĉi. Li faris tion kiel gasto en restoracio. La trajna menuo de la malgranda stacieto estis aĉa. Ne estis tro por elekti: Ježovice, Kaĝolin, Barcz. "Mi havas", li diris kun kontento, "mi havas por vi Pustków. La kvina haltejo post Górow. Arbaro. Du kabanoj sume. De la staciestro kaj arbaristo. La arbaristo surda, maljuna. La virino gastama. Kaj lago. La lago ne kulturata, sovaĝa. Depost la tempo kiam oni donis ĝin al kooperativo ne estas fisiŝtoj. Akva dezerto, ne lago. Povas esti al Pustków." "Povas esti", diris la pasaĝero. "Donu al tiu Pustków."

"Per la dua? - demandis la kasisto.

"Per la unua", diris la pasaĝero.

"Ne", meditis la fervojisto, "ne valoras. Sep haltejoj, kaj la trajno malplena. Cetere la unua klaso entute ne estas en tiu vagonaro."

"Donu la duan."

La kasisto sur-nazigis okulvitrojn kaj komencis plenigi la dua-klasan bileton al Pustków. Kie estas lago, kvieto kaj la gastama virino de la duon-surda arbaristo, kaj kie oni pensas pri nenio.

La pasaĝero apogis sin per la kubutoj je la kasa rando kaj rigardis kiel la fervojisto plenigas la bileton.

Ĝuste tiam aliris lin knabino. Ŝi estis juna kaj tre bela.

"Venu hejmen", ŝi diris al la homo, kiu ne konis la cel-stacion de sia vojaĝo. "Panjo ploras."

La kasisto ĉesis plenigi la bileton. Li malfermis la tirkeston, prenis liniilon, almetis ĝin al la biletaj pintoj kaj kruce trastrekiĝis ĝin per dikaj ruĝaj linioj.

El la pola tradukis: Jerzy Grum

**PS:** PKP = mallongigo de Polaj Ŝtataj Fervojoj

Trovita en William Auld: Paŝoj al plena posedo (progresiga legolibro kun lingvaj ekzercoj), unua eldono 1968

**PSS:** La fotojn faris Hans-Georg Kaiser, ili ekestis en stacidoma muzeo kaj restoracio en Lunzenau en Germanio.

El la blogaro <https://cezarkulturo.blogspot.com> de Hans-Georg Kaiser (Cezaro)

Tie ankaŭ troveblas la germanlingva versio de la rakonto.



Espéranto-France fieras prezenti al vi sian novan libron kies titolo estas *Stranga Malapero*.

La rakonto okazas en Korsiko, insulo sude de Francio. Estas la lerneja jarfino kaj la lernantoj preparas la teatraĵon *La Avarulo* de Moliero. Sed okazas strangaj eventoj: iu stranga persono aperas kaj la patro de Karla kaj Enzo malaperas...

La libro estas bunte ilustrita, ĝi enhavas plurajn kaj amuzajn ekzercojn (kaj korektojn). Registritaj voĉoj disponeblas sur la retejo por personoj kiuj aĉetis la libron.

Provaĝoj kaj priskribo troviĝas sur la retejo:

<https://facilaj-rakontoj.esperanto-france.org/>


La libro kostas 9 eŭrojn. Speciala prezo de 6 eŭroj ekde 10 libroj aĉetitaj samtempe.

Vi povas mendi la libron rekte sur nia reta butikio (franclingve):

<https://butikio-esperanto-france.org/lectures-faciles/896-stranga-malapero.html>

aŭ kiel kutime, petante per retmesaĝo al: [butikio@esperanto-france.org](mailto:butikio@esperanto-france.org)

*Bonan legadon,*



# LUMINESK

*Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio*

**28.12.2021 - 03.01.2022**  
**Münster / Germanio**

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto Asocio. Ĝi nun okazos la sesan fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj "Internaciaj Festivaloj" private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon - lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj.

Luminesk'-kunvenejo estos la junulara domo de Münster, kiu situas apud la lago Aasee meze en la urbo. La domo estas moderna, ĵus plia konstruaĵo estis aldonita. Necesejo kaj duŝo situas en la ĉambro. La nuna domo estis konstruita en la jaro 1992. Sufiĉe apude situis la malnova junulargastejo, kiu havas faman historion en la Esperanto-mondo:



	ĝis 2021-08-27	ĝis 2021-10-31	poste*
<b>kotizo</b>	<b>440 €</b>	<b>460 €</b>	<b>490 €</b>

\* necesa antaŭpago por validigi la aliĝon: 50 €

La kotizo inkluzivas la restadon de la 28a de decembro 2021 vespere ĝis la 3a de januaro 2022 matene (loĝado en dulita ĉambro, tri manĝoj tage, programo kaj silvestra bufedo). Unulitaj ĉambroj 140 eŭroj por tuttempaj partoprenantoj **23,33 eŭroj tage**.

La ekskursoj estas pagendaj aparte.

Eblas **partatempa** partopreno je kotizo de **85 eŭroj nokte** (inkl. 3 manĝoj kaj programo).

**Tagaj gastoj** pagas **50 eŭrojn** (inkl. 3 manĝoj kaj programo).

**Atentu:** Ĉi-jare Luminesk' daŭras nur ses noktojn, pro organizaj kialoj flanke de la domo.

## Pago

Aliĝo ekvalidas per **antaŭpago de 50 €** al jena konto de Germana Esperanto-Asocio:

IBAN: **DE53 5058 1952 0040 1158 42** (Sparkasse Odenwaldkreis) BIC: **HELADEF1ERB**

Pagcelo: Luminesk' 2021 Münster + via nomo

aŭ per UEA-Konto: **geaa-n**.

Bonvolu ĝiri la restsumon ĝustatempe antaŭ la komenco de la aranĝo.

Kontakto: Andreas Diemel  
Retpoŝto: [demandoj@luminesk.de](mailto:demandoj@luminesk.de),  
ene de Germanio: 0800 3 36 36 36 64  
(senkosta)  
internacie +49 203 29 64 877 (fiksreta)

Aliĝilo kaj pliaj informoj ĉe: <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/pri-luminesk>

Okaze de bezono, nia kasisto pretas peradi viajn antaŭpagojn kaj pagojn. Bonvolu kontakti lin: [andreo.ag16@sfr.fr](mailto:andreo.ag16@sfr.fr)



## Aliĝilo

Mi partoprenos

tuttempe

parttempe de \_\_\_\_\_ ĝis \_\_\_\_\_

Mi volas manĝi  vegetare  vegane

Mi ŝatas  dulitan  unulitan ĉambron\*

Mia nomo aperu en la reta listo de aliĝintoj

Mi antaŭpagos 50 € per

IBAN-ĝirado  UEA-Konto

ĝis plej malfrue la \_\_\_\_\_-an de \_\_\_\_\_ 2020

## Rememoroj pri infana tempo en Japanio

Jen Keiko Sanpei rememoras pri sia infanaj jaroj, pri la frizejo en kiu laboris ŝia avino.

### Beligejo

La tombejo de miaj gepatroj estas en Takanaŭa proksime de fama templo Sengakuĵi. Antaŭ kelkaj jaroj mi vizitis la templon en la printempa ekvinokso. Poste, mi marŝis al la stacidomo Gotanda, kie mi uzis la vagonaron ĝis Togoŝiginza. Antaŭ la lasta milito mi loĝis en tiu urbo ĝis la 7a jaraĝo.

Mi trovis, ke la ĉirkaŭaĵo de la stacidomo estis ŝanĝita al viglaj gajaj vendejaj stratoj. Mi piediris sur nekruta deklivo al la elementa lernejo. Mezvoje de la deklivo estis mia familia domo kaj najbara domo de miaj geavoj. La avino estis japaneska har-aranĝistino, do ilia unu-etaĝa ĉambro havis vastan tabul-plankon (pageto), sur kiu estis metita alta gramofono kun diversaj kantoj kaj melodioj.

En la komenco de ŝo-ua epoko (1901 ĝis 1989) virinoj ankoraŭ aranĝis siajn harojn japaneske por specialaj tagoj.

Kun memoro mi plue marŝis la deklivon, tiam subite aperis alta konstruaĵo antaŭ mi.



Ekzemplo de Kanzaŝi-ornamaĵo

Fakte ĝis antaŭ 1945 sur ĉi tiu tereno

estis mia familia tereno kaj staris mia familia domo kaj avina malnovstila beligejo. Dum la 25a de majo 1945 ĉion oni forbruligis per bomboj. Kaj nun tute surprize la unua etaĝo de tiu alta konstruaĵo ŝanĝiĝis al moderna frizejo kaj beligejo. Mi sentis ian misteran kaŭzon. Kaj mi supozis, ke la avino ankoraŭ nun ĝoje laboras en la beligejo. Mi plu malrapide piediris al la deklivo ĝis la elementa lernejo, kiu tiam ankaŭ ricevis la bombadon en la sama tago.



Apud lerneja pordo mi trovis kelkajn malgrandajn budaojn.

Sanpei Keiko



*"Mi konsideras Esperanton kiel grandan esperigon de miaj samsortanoj. La unua kaj la plej bona helpo al blindaj kaj surdaj homoj povas veni nur el niaj propraj vicoj, kaj ju pli ni kunagas trans ĉiujn landlimojn, des pli granda estos ankaŭ la helpo. Por supernacia interkompreniĝo oni bezonas supernacian lingvon por eviti maloportunecon de tradukoj. Inter la blinduloj, la rondo de esperantistoj konstante pligrandiĝas." Helen Keller (1880-1968) usona, surda kaj blinda verkistino, aktivulino, prelegantino, socialista kaj feminista. "*

*Je considère l'espéranto comme un grand porteur d'espoir pour ceux qui partagent mon sort. La première et la meilleure aide aux aveugles et aux sourds ne peut venir que de nos propres rangs, et plus nous agissons ensemble à travers toutes les frontières, plus grande sera l'aide. Pour une compréhension supranationale, on a besoin d'une langue supranationale pour éviter l'inopportunité des traductions. Le cercle des espérantistes ne cesse de croître parmi les aveugles.*

## Goma en DR Kongo kaj ties problemoj pri akvo

Goma estas urbo oriente de DR Kongo, ĝi estas la ĉefurbo de la provinco Norda Kivuo. Ĝia surfaco ampleksas 66324 kvadrat-kilometroj .

Ĝi enhavas almenaŭ 1100 000 enloĝantojn. Pro la ĉiutagaj militoj en la komunumoj ĉirkaŭ la urbo Goma, multaj personoj migras al ĝi. France ni parolas pri \*Exode Rural \* Homoj rifuĝas al Goma pro manko de sekureco en siaj vilaĝoj.



La granda lago Kivu apud Goma.

En tiu urbo homoj vivas en malfacilaj vivkondiĉoj, la sanaj kondiĉoj ne estas respektataj precipe en popularaj kvartaloj. La plej granda malhelpo al kiu sin frontas la loĝantaro en Goma, estas la manko de pura akvo en la tuta urbo malgraŭ la najbareco al la lago Kivuo. Pli ol la 3/4 de la loĝantaro ĉerpas akvon el la lago. Pro tiu malfacila aliro al pura akvo, ĉiu enloĝanto estas devigata uzi tiun akvon de la lago Kivuo, kiu estas malbonkvalita kaj estas la fonto de multnombraj malsanoj, kiel la lakso, ĥolero, tifoid-febro, ĉiuspecoj de vermifugoj, ĉar tiu akvo ne estas bonkvalita, kaj niaj registaroj ne pensas pri la bonsano de sia loĝantaro. La loĝantaro uzas tiun ne desinfektitan akvon por siaj diversaj familiaj bezonoj.

Por ĉerpi tiun akvon, oni uzas sitelojn, lad-botelojn. kaj nur virinoj kaj infanoj ankoraŭ-foje multe suferas por provizi akvon al siaj familioj. Ili devas marŝadi multajn kilometrojn al la lago por havi nur 20 litrojn da nebonkvalita akvo.

Aliaj malhelpoj por tiu akvo en Goma

estas, ke okazas dronado de infanoj, kiuj iras ĉerpi akvon en la lago (vidu sur la bildoj)

Alia malhelpo estas la ĉiutagaj virin-seks-perfortoj, ĉar bedaŭrinde virinoj vekiĝas frue matene aŭ malfrue vespere, por trovi akvon. Goma estas plena de banditoj, kiuj dum la noktoj atakas tiujn malfeliĉajn virinojn. Vere, pro Akvo, virinoj en urbo Goma multe suferas.



Goma giganta urbo sur

Nur kelkaj personoj, kiuj havas eblecojn, aĉetas akvojn de malmultaj sisternaj kamionoj, kiuj vendas puran akvon, ĉar oni desinfektas ĝin antaŭ ol ĝin vendi.

Kial oni ne trovas akvon per tuboj, kanalizacioj kaj kranoj en la urbo Goma? Tio estas bona demando. Goma estas vulkana urbo kaj la plej antaŭa vulkana erupcio de Nyiragongo kaj Nyamulagira okazis je 2002. La tuta urbo Goma estas kovrita de lafo. Pro tio, fari kanalizaciojn multe kostas. Nur neregistaraj organizoj (NGOs) provas fari ion por provizi puran akvon al la loĝantaro por protekti ĝin kontraŭ danĝeraj malsanoj kiel la ĥolero, ebola kaj nun, la KRONVIRUSO. Ĉiuj scias, ke sen lavi regule manojn, kronviruso rapide kaj facile sin transdonas de unu al alia. La registaroj neniam planis provizi puran akvon al sia loĝantaro malgraŭ, ke ili bone scias, ke AKVO estas la vivo.



Teksto de Natasha kaj Elvis Hakizumwami

Ĉerpi akvon ĉe la bordo...



Longa vico da lad-botelegoj



Infanoj ne vizitas lernejon





## Novaĵoj de GOMA kaj de la vulkano NYIRAGONGO

**RESUMO:** Erupciis la vulkano Nyiragongo sabaton la 22an de majo 2021. La giganta urbo Goma (pli ol unu miliono da enloĝantoj) jam estis akirinta sperton post la erupcio de 2002, kiu detruis parton de la urbo, kaŭzis multajn mortintojn kaj detruis la flug-havenon. Feliĉe, ĉi-jare, la urbon GOMA la lafo preskaŭ ne trafis. Tamen la loĝantaro estis ricevinta ordonon evakui! Kelkaj loĝantoj fuĝis al Gisenyi apuda urbo en Ruando. Poste, ili revenis hejmen, sed fortegaj tertremoj daŭre okazis, timigante la homojn pri novaj lafo-alvenoj!

**Raportas Pierre Grollemund**

Tuj post la erupcio, esperantistoj de Eŭropo ricevis alvokojn por helpo. Kelkaj partoprenas agadon de vere helpemaj asocioj, sed eble kelkaj volas profiti la okazon por peti monon de malavaraj, solidaremaj esperantistoj. Ni estu singardaj kaj petu informojn de niaj asocioj!

En Goma vivas pluraj esperantistoj, kiujn ni konas de longaj jaroj kaj al kiuj ni povas plene fidi. Ĉiel, ili ne tuj petis monon. Sed sendis mesaĝojn pri la okazintaĵoj. Vidu ĉi-sube:

Ekzemple, jen mesaĝoj de amiko de l'aŭtoro de tiu artikolo: Li suferas pro grava pied-vundo kaj ne povas normale piediri:

**22.05.2021** *“Saluton kara Pierre, preĝu por ni ĉar la vulkano*

*Nyiragongo minacas la urbon tiun nokton. Homoj forkuras sen precizaj direktoj. Kun mia protezo mi ne scias kion fari, ĉar ne eblas preni veturilojn aŭ motorciklon. Ĝis baldaŭ. Morgaŭ mi skribos al vi.”*

**23.05.2021** *“Saluton kara amiko, hieraŭ sabate dum la vespero mi sendis al vi mesaĝon por vin informi, ke la vulkano NYIRAGONGO eksplodis kaj invadis la urbon Goma kaj la najbaran landon, Ruando. Feliĉe, en tiu mateno ni rimarkas, ke la lafo ekestingigis. Nur kelkaj domoj estis englutitaj. Ĝis nun ni ne havas precizajn informojn pri kiom da personoj pereis. Estonte ni havos precizajn informojn pri kio okazis.*

*Pri mia familio: ni sukcesis trovi sekuran lokon je 20 km de Goma, kie specialistoj pri vulkanoj preparis por ke la loĝantaro alkuru okaze de vulkanaj eksplodoj, al la distrikto de Masisi sed tiu-matene, homoj komencas rehejmiĝi, ĉar lafo ekmalvarmiĝas. Kara amiko, mi pensas ke la situacio bone evoluos. Atendante tion, oni konsilas al ni kiuj havas sanajn problemojn iom atendi antaŭ ol ni venos hejmen”.*

**29.05.2021** *“Saluton kara Pierre, certe vi konas pri la situacio, kiun ni trairas en Goma. Ĉar la fluo de la lafo haltis, ni supozis, ke la situacio rapide normaligiĝos, sed tute ne.*

*Post la fluo de la lafo, venis etapo de **teruraj tertremoj**. Jam de unu semajno en Goma kaj ĉirkaŭaĵoj tertremas. Tiom ke la aŭtoritatoj devigis nin forkuri for de Goma, ĉefe pro timo de morta gaso (metana gaso aŭ CO), kiu troviĝas en la kivuo-lago. Ĝia kontakto kun lafo okazigus homan amas-mortigon en la tuta urbo.*

*Nun imagu, kara Pierre, mi kun mia unua kruro: kian malbonan periodon mi trairas en mia vivo.*

*Feliĉe, dank'al amikoj kaj familianoj mi sukcesis eskapi.*

*Hodiaŭ ni rifuĝis al Masisi distrikto je 30 km de Goma.*

Rimarko de la aŭtoro: kiam aperos tiu artikolo en nia revuo La INFORMILO, la situacio eble estos stabiligiĝinta. Bedaŭrinde multaj personoj dormas ekstere, post perdo de sia domo. Sed plu restos la ĉiu-tagaj problemoj de la loĝantoj en tiu urbo: nutrado-akiro, malsekureco, provizado je salubra akvo, kaj tiel plu. Bedaŭrinde, la Konga registaro agadas tre malmulte favore al sia popolo. Ĉu ĉi-foje estos pli bone? Ni vidos. Koruptado kaj manko da rimedoj malebligas veran socian politikon, pri edukado, sano, riparado de vojoj kaj similaj temoj. Sed la homoj ne malesperas kaj plu vivas.

(Vidu kroman artikolon pri AKVO-PROBLEMO en GOMA)

Pierre



## En 2017, tri pomarboj "Esperanto" alvenis en Loreno Trois pommiers "Espéranto" sont arrivés en Lorraine

Emmanuel Rolland kreis "La ĝardeneton de la lernantoj", en Côtes d'Armor (Francio) kaj instigis tiun projekton.

Esperantisto, kiu rilatis kun li, miris, kiam dum printempa tago, li malkovris en amaso da kruda stonaĵo, florantan pomarbon. Dum la sekvanto aŭtuno, ĝi produktis belajn, ruĝajn pomojn, kies specio estis nekonata. Li proponis greftaĵojn al Emmanuel, kiu dank'al siaj kapabloj, reproduktis aliajn ekzemplerojn de tiu-ĉi arbo.

Ĉar tiu-ĉi specio nekonatas, ili decidis ĝin nomi "la pomo Esperanto", la pomo de la espero. Inter tiuj klonoj, tri alvenis al Loreno ĉe Liliane, Gisèle kaj al la asocio "pom-manĝegantoj" ("croqueurs de pommes")

La pomarbo de Liliane estis 50 cm alta kaj nun ĝi atingas 170 cm.

En Loreno pomarboj malrapide kreskas kvankam dum la jaro 2019 du floroj aperis, sed frostiĝis antaŭ ol esti fekunditaj.

Ĉi-jare multaj floroj kovris la arbon, sed frosto ruinigis la kamparon ĉirkaŭ Xeuilley. Mi nur esperas, ke kelkaj floroj estos savitaj kaj ke mi povos gustumi unu aŭ du pomojn dum aŭtuno!

Mia pomarbo estis transplantita iomete pli malfrue ol tiu de Liliane, ĉar la planto-truo ne estis preta. Ĝi estas nur iom pli ol unu metron alta. Tamen ĝi produktis ĉi-jare, florbukedon. Mi esperas, ke ĉi-jare, aŭtune, tiuj malmultaj floroj fariĝos bonaj fruktoj.



Emmanuel Rolland, fondateur du jardin des écoliers des Côtes d'armor, est à l'initiative de ce projet.

Un espérantiste, qui était en relation avec lui, a eu la surprise, un jour de printemps, de découvrir dans un tas de remblais un pommier en fleurs. A l'automne ce pommier a produit de belles pommes rouges d'une variété inédite.

Il a proposé des greffons à Emmanuel, qui, grâce à "ses mains vertes" a reproduit d'autres exemplaires de cet arbre.

Cette variété étant inconnue, ils ont décidé de l'appeler "Pomme Espéranto", la pomme de l'espérance et de l'espoir, Parmi ces clones, trois sont arrivés en Lorraine chez Liliane, Gisèle et l'association des croqueurs de pommes.

Le pommier de Liliane mesurait 50 cm et actuellement culmine à 1,70m!

Donc, en Lorraine ces pommiers poussent lentement mais déjà en 2019 chez Liliane 2 fleurs sont apparues mais elles ont gelé avant d'avoir pu être pollinisées,

Cette année, chez moi, plusieurs fleurs sont écloses... mais dans ma campagne le gel a encore fait des ravages! J'espère quand même que quelques fleurs seront sauvées

et que je pourrai croquer une pomme ou deux à l'automne!

Mon pommier "Esperanto" a été transplanté un peu plus tard que celui de Liliane car le trou de plantation n'était pas prêt. Il ne mesure qu'un peu plus d'un mètre. Cependant il a produit cette année un bouquet de fleurs. J'espère que ces quelques fleurs deviendront de bons fruits à l'automne.

Gisèle Bertapelle

Liliane Bersweiler





*Bonan  
Eŭropo-  
tagon  
al ĉiuj  
el mia  
ĝardeno*



*Refloru  
la esperanta  
vivo kaj  
nia amikeco!  
Dlej kore!  
Jean-Luc*



**Nia foto-paĝo**

**De vintro al  
printempo**


**En Slovakio**



**Lastaj neĝoj**



**Printempo en Alzaco**



**Novaj floroj**

